Eleanor Farjeon,

Lumas mateno

tradukita de Manfred Retzlaff

Lumas mateno kiel komence,
Kanto de merlo, laŭdo de Di'.
Dank' por la kantoj kaj la mateno,,
Danku nin Dion por ĉio ĉi.

Falas pluvgutoj sunlumigitaj,
Kuŝas unua ros' sur la gres'.
Dank' pro la Dia spur' en-ĝardena,
Benas la Teron Dio sen ĉes'.

Mia la suno kaj la mateno!
Bril' de Edeno aperas al mi.
Danku ni Dion, danku senlime!
Ree salutas la lum' ni de Li.

Traduko de la Angla poemo "Morning has broken" de ELEANOR FARJEON *(∗1881-02-13 – †1965-06-05) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 2014-06.*

Arg-986-2178 (2014-07-17 15:45:43)

Eleanor Farjeon,

Morning has broken

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas ELEANOR FARJEON *(∗1881-02-13 – †1965-06-05).*

Arg-986-1987 (2014-03-24 19:17:22)

Vidu ankaŭ:`http://www.allspirit.co.uk/morning.html`*. Pri la verkintino vidu la retejojn* `http://en.wikipedia.org/wiki/Eleanor_Farjeon` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Eleanor_Farjeon`*. Pri la kanto "Morning has broken" vidu:* `http://en.wikipedia.org/wiki/Morning_Has_Broken` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Morning_Has_Broken`*.*